

Enhavo

- **anoncoj**

Novaj varoj en la retbutiko; Aliĝu senpage al ISAE; Landa Kongreso en 2017 okazos en Norda Karolino; Korespondi deziras; Helpopeto por esperantistoj en Kongolando; Rabato por lernintoj en Duolingo kaj aliaj kursoj; Nova kaj plibonigita Lernu.net!; New York lecture series to commemorate Tivadar Soros

- **loke**

Monda socia forumo en Montrealo; Presu viajn informilojn!

- **Benko de mia avo**

la amatora lignaĵisto - Daĉjo Rutan

Mia onklino havas benkon, kiu apartenis al mia avo. Ĝi estas kutima kvin-tabula benko. Iam, kiam mi estis ĉe ŝi, mi notis la mezuron por konstrui mian propran.

- **leterkesto**

Diru al iu pri Esperanto; Profunda instruisto; Instruu pli da matematiko kaj rezonado; Venu kaj klaĉu

- **Bridge of Words**


libroj

A new history of Esperanto and Zamenhof by Esther Schor.

- **Leki**

senintenca esperantaĵo?

Ĉu leki aŭ ne leki? Jen facila demando.




Novaj varoj en la retbutiko

- **Danny Johnson Saves the World** [<https://goo.gl/HfzQSE>]

Christopher R. Mihm.

Young Danny Johnson must use his smarts and adventurous spirit to stop devious pint-size aliens — and their unstoppable robot — from brainwashing the children of earth as a precursor to worldwide domination in this retro-styled sci-fi B horror film. Esperanto dubbing and subtitles courtesy of George Baker and many Esperantists from around the world. DVD. 68 mins. 2015. USA. \$10.00



Membroj ricevas 10% da rabato kun multaj varoj. Mendu de *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, aŭ rete [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

Aliĝu senpage al ISAE

Dum la Universala Kongreso en Lillo la Internacia Scienca Asocio Esperantista [<https://goo.gl/obK1JB>]

anoncis, ke aliĝo al nia asocio estas senpaga! Ni do invitas vin aliĝi per reta aliĝilo [<https://goo.gl/U4fdKM>].



Aliĝo gravas pro diversaj kialoj:

- Se vi estas sciencemulo, tiel vi subtenas nian agadon kaj kuraĝigas nin daŭrigi ĝin.
- Por nia interago kun UEA, ni rajtas havi unu komitatanon "A" se ni atingas 100 membrojn. Tiu gravas por antaŭenigi dialogon pri scienco en Esperantujo kun aliaj asocioj.

La estraro esperas, ke vi favore respondos al tiu invito!

— Anthony LUCAS, Prezidanto, ISAE

Landa Kongreso en 2017 okazos

en Norda Karolino

Per voĉdono de sep jeso, unu neo, kaj du sintenoj, la estraro aprobis proponon okazigi la Landan Kongreson de la 30-a de Junio ĝis la 3-a de Julio ĉe la Universitato *William Peace* en Raleigh, NC. Ĝi okazos samloke kaj sinsekve kun la Nord-Amerika Somera Kursaro.



Korespondi deziras

Mi nomiĝas s-ro Honoré Sebuhero Ndarihorange, kaj mi estas instruisto pri zoologio, matematiko, kaj Esperanto en lernejo. Mi estas edzo kun kvin gefiloj, loĝanta en orienta provinco Kivu / D. R. Kongo.



Mi esperantistiĝis en 2006, kreis aktivan e-klubon *Verda*

Stelano-Klubo en 2009, kaj en 2012 mi enkondukis E-instruadon en nian instituton Béthanie Rutshuru. Ni volas amikiĝi kun vi koresponde kaj interŝanĝi niajn kulturojn per nia karega lingvo Esperanto. Ni ŝatas ekologion, turismon, kulturon, legaĵojn, ktp.

Honoré Sebuhero, Eglise CEBCE REMERA, PO BOX 08 BUNAGANA, KISORO/UGANDA. <honsebn@gmail.com>



My name is Elson Patricio. I am Brazilian. I am learning Esperanto and English, and I would like to make friends with an American penpal.

<epelson2014@hotmail.com>

Helpopeto por esperantistoj en Kongolando

Noto de la redaktoro: Ron GLOSSOP petis, ke ni anoncu la suban helpopeton en la bulteno. Li aldonis la jenan:

Mi bone scias pri la situacio de la esperantistoj en la regiono de Norda Kivuo en Demokrata Respubliko Kongolando. Mi komuniĝas kun Faraja N. TUGABA COLONNEL kaj ankaŭ kun Mana BRINSON kiu iomete helpas la aliulojn. Mi jam sendis ducent usonajn dolarojn. Mi esperas, ke aliaj usonaj esperantistoj ankaŭ sendos iom da mono al sinjoro Brinson per *Western Union* aŭ *Moneygram*.

Se vi volas helpi, bv. sendi mesaĝon al Ron ĉe <rglossop@mindspring.com>.

Mi estas la Kunordiganto de Esperanto-movado en Beni-Urbo, provinco de Norda Kivuo en Demokratia Respubliko Kongolando. La orientaj provincoj de nia lando tre ofte suferas pro la diversaj militoj; okazis pasintsabate masakron de pli ol 53 geĉivitanoj. Ne estas facila afero por KAE (Klubo de la Amikoj de Esperanto) helpi niajn familiajn viktimojn.



Estas danĝero pri nova milito en DRK, kaj la situacio en nia Norda Kivuo estas plej danĝera! Ni sendas tiun ĉi krion por ke vi provu helpi nin, kies nombro estas 15 gesamideanoj kun niaj infanoj, cetere.

Multaj kongaj civitanoj provas vojaĝi trans Mediteraneon por trovi sekuran vivejon en Eŭropo. Ili multe pagas al transportistoj, ofte krimuloj, kies boatoj kaj ŝipoj estas danĝere malbonaj, pereas laŭvoje kaj centoj dronas. Multaj opinias, ke estas pli bone intence pereigi ŝipon/boaton aŭ salti en la

maron por esti iom pli bone traktata en la celata lando ol esti mortigita maĉete en sia propra lando.

Tiam estiĝis malrapide al mi la ideo: ĉu via komunumo ne povus pleniĝi ĉi tiun truon helpante nian familieron? Ekzemple, donacante 1000 usonajn dolarojn por ke ni aĉetu ŝuojn, vestaĵojn, nutraĵojn, sapon kaj puran botelan akvon, ĉar ni fuĝis senŝue kaj sen vestaĵoj kaj nutraĵo.

— *Faraja N. TUGABA BIN COLONNEL*

Rabato por lernintoj en Duolingo kaj aliaj kursoj

Per voĉdono de sep jesoĵ kaj tri sintenoĵ, la estraro aprobis proponon oferti rabaton je membreco por novaj esperantistoj. La rabato validas por finintoĵ de baza kurso ĉe Duolingo, ĉe aliaj retaj kursoĵ, kaj ankaŭ de koresponda aŭ klasĉambra kurso akceptita de la Estraro de Esperanto-USA.



Nova kaj plibonigita lernu.net!

La teamo de *lernu!* [<http://lernu.net>] ĝojas anonci la plenan relanĉon de la paĝaro. La nova lernu.net enhavas novan interesan kurson de Esperanto kun centoj da ekzercoĵ, ilustraĵoj kaj granda serĉebla biblioteko. La retejo estas plene modernigita kaj funkcias kun novaj retumiloĵ kaj retaj teknologioĵ, kiuj ne ekzistis kiam la antaŭa versio de la paĝaro estis lanĉita.



La plena 26-lectiona kurso de la nova paĝaro estas bazita je rakonto de konata verkisto Anna LÖWENSTEIN, kun ekzercoĵ de edukisto Birke DOCKHORN. La kurso havas abundajn ekzercoĵn, ilustraĵojn, kaj sonojn, kaj sekvas la gvidliniojn de KER (Komuna Eŭropa Referenckadro) pri lingvolernado. La nova paĝaro ankaŭ enhavas detalan gramatikon de Esperanto kaj referitajn foruman sistemon, vortarojn, kaj tradukilon. La teamo daŭre aldonas novajn materialojn kaj funkciojn al la nova paĝaro, do revizitu ĝin ofte por vidi la ŝanĝojn kaj plibonigojn!

Lernu.net ekestis kaj ekzistas danke al malavara subteno de *Esperantic Studies Foundation* (ESF), kiu, siavice, ekzistas danke al malavara subteno de ESF-subtenantoj, al kiuj ni aparte dankas. Kiel skribis Fernando MAIA Jr. de Brazilo, “Mi donacas al ESF, ĉar mi konsentas kaj fidus je la realigata laboro. ESF tenas kaj subtenas kelkajn el la plej gravaj spacoj por Esperanto en la reto, ĉiam kun moderna rigardo kaj entuziasmigaj rezultoj.” Ni petas vin konsideri fari donacon al ESF/Lernu [<http://esperantic.org/donations>] ĉi-jare: (eblas donaci unufoje aŭ ĉiumonate). Eblas ankaŭ donaci al UEA-konto *esfo-p* aŭ per ĉeko: *Esperantic Studies Foundation, COP Ste. Catherine, CP 60502, Montréal QC H1V 3T8, Canada*
— Ĵenja AMIS

New York lecture series to commemorate Tivadar Soros

The lecture series, made possible by a grant from the Esperantic Studies Foundation, is sponsored by the Linguistics Program at the Graduate Center of the City University of New York, 365 Fifth Avenue (at 34th Street). The lecture will take place in room C198 on Friday, December 16, 2016, at 4:00 p.m. The lectures are free and open to the public.

Esther Schor, author of *Bridge of Words* will be the first speaker in a series of lectures memorializing Tivadar Soros, whose memoir *Masquerade*, written in Esperanto, recorded his successful efforts to keep his family alive and intact in Hungary during the Nazis' round-up and murder of thousands of Jews. The family ended up coming to the United States, where his son, George Soros, rose to prominence in

the financial and humanitarian worlds.

Professor Schor's lecture will be introduced by Humphrey Tonkin, president emeritus of the University of Hartford, who will speak about the life and achievements of Tivadar Soros. Professor Tonkin translated Soros's two books from Esperanto into English as *Masquerade* [<https://goo.gl/2LAjBo>] (2000) and *Crusoes in Siberia* [<https://goo.gl/uS344X>] (2010).

Professor of English at Princeton University, Esther Schor has studied the origins and development of the International Language Esperanto and its position in the modern world. In many respects her new book is a reaffirmation of the importance of Esperanto as a social movement in today's world. According to a review in the New York Times, it “leaves us in no doubt that whatever Esperanto might be doing, it seems to be doing it right.”

Future lectures will feature Michael Gordin, professor of modern and contemporary history at Princeton University (on a connection between Albert Einstein and the international language movement), Brigid O'Keeffe, professor of history at Brooklyn College (on Esperanto in the early years of the Soviet Union), Ulrich Lins, historian and author (on the persecution of Esperanto speakers under Hitler and Stalin), Nico Israel, professor of English at Hunter College (on James Joyce and Esperanto), and Ulrich Becker, New York-based publisher of Esperanto books (on publishing in Esperanto). The lecture series will go through Fall, 2017.

More information is available at soroslectures.org [<http://soroslectures.org>].



Monda socia forumo en Montrealo

Komence de Aŭgusto 2016, la unuan fojon en la norda hemisfero, okazis la 12-a Monda Socia Forumo (MSF). La MSF estiĝis en Porto Alegre, Brazilo en 2001 kaj ĝis nun ĝi okazis en Brazilo, Barato, Venezuelo, Kenjo, Senegalio kaj Tunizio. La MSF estas evento, en kiu la alimondistoj kunordigas kampanjojn kaj informas unu la alian pri la alimondistaj movadoj en la diversaj mondopartoj. En Montrealo partoprenis ĉirkaŭ 15 mil personoj el pli ol 100 landoj.



Ĉu tio estis bona medio por varbi pri Esperanto? Kompreneble! Fakte, eĉ bonega medio! Nia teamo aktive partoprenis, unue, en la marŝado por la Tero kun granda banderolo. Poste ni starigis budon dum tri plenaj tagoj kaj ni ankaŭ havis la okazon prelegi dufoje pri nia Movado france kaj angle. Ni disdonis pli ol mil informilojn (angle kaj france): estis belaj poŝkalendaretoj kaj paĝmarkiloj kun la nomoj kaj informoj pri la Universala Esperanto-Asocio, Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Societo Kebekia. Danke al nia talenta teamo, ni povis varbi france, angle, hispane portugale kaj eĉ japane. Multaj forumantoj miris, ke ni povas respondi plurlingve, ĉar en pluraj budoj nur la angla estis uzata. La tri oficialaj lingvoj de la forumo estis la franca, angla kaj hispana sed krom la presita programo, kiu estis trilingva, okazis interpretado nur dum ĉefaj prelegoj. Ne eblis pagi por interpretado dum la pli ol 1200 programeroj, kiuj okazis dum la forumo...


Jes ja valoris partopreni ĉar multaj forumantoj menciis al ni, ke ili ja intencas tuj eklerni Esperanton pere de Lernu.net.

Ni dankas al la Kanada Esperanto-Asocio kaj la Esperanto-Societo Kebekia, kiuj finance apogis nian partoprenon en MSF, kaj al UEA, kiu morale subtenis nin en tiu iniciato.

— Normando FLEURY

Presu viajn informilojn!

En Esperanto-Societo Kebekia kaj Kanada Esperanto-Asocio ni jam delonge pensis fari novajn informilojn pri Esperanto, kaj en la preparoj por la Monda Socia Forumo en Montrealo ĉi-jare ni fazonis tre belajn kalendaretojn kaj paĝ-indikilojn por reklami Esperanton kaj niajn asociojn.



Antaŭ ĉio, ni volis fari utilajn reklam-materialojn, kiujn homoj volus teni, malsimile al la kutimaj informiloj, kiuj ofte finas sian vivon en rubujo post nur kelkaj sekundoj da rigardo. Mi ĉiam admiris la reklam-materialojn de Esperanto-France, kaj mi aparte ŝatis iliajn ĉiujarajn poŝkalendaretojn kun bazaj informoj pri Esperanto, kaj ni volis fari ion similan.

La esperantistoj el Francujo bonkore permesis al ni uzi ilian fasonon, sed ni finfine decidis fari ĝin ĉe ni pro la malsama formato de papero, kaj ni ankaŭ volis meti aliajn informojn kaj frazojn taŭgajn por nord-amerika kunteksto. Do, post longa laboro, ni presigis belegajn kalendaretojn por 2017 en du lingvoj: la angla kaj la franca.

La materialoj estis tiom sukcesaj, ke la franca versio de la kalendaretoj rapide elĉerpigis. Pluraj amikoj el Usono kaj Kanado petis la fasonon por ke oni povu presi por sia klubo, kaj mi dividis ĝin jam kun pluraj homoj, sed mi pensis, ke verŝajne estas pluraj aliaj, kiuj ŝatus uzi ilin. Do, mi metis la pres-pretan dosieron en la reton, tiel ke ĉiuj, kiuj volas, povu uzi ilin. Oni povas presi la kalendaretojn tre malmultekoste ĉe *VistaPrint* [<http://www.vistaprint.com/folded-business-cards.aspx>] aŭ kiu ajn alia presejo, kiu faras faldeblajn vizitkartojn (oni simple alŝutu la dosieron, elektu paperkvaliton kaj preskvanton, kaj oni ricevos la presaĵojn post kelkaj tagoj perpoŝte).

Por aliri la dosierojn, iru al mia dosierujo ĉe *Google Drive* [<http://tiny.cc/gvs5cy>].

— Ĵenja AMIS

Benko de mia avo

Daĉjo RUTAN

Mia onklino havas benkon, kiu apartenis al mia avo. Ĝi estas kutima kvin-tabula benko. Iam, kiam mi estis ĉe ŝi, mi notis la mezuron por konstrui mian propran.

Materialoj

Mi uzis najlojn, farbon, kaj du pinlignajn tabulojn 6' (2 metrojn) longaj. (Laŭ la nordamerika nomsistemo, la tabuloj nomiĝas 1×3 kaj 1×12 – vidu detalojn sube.) En Usono oni trovas tiajn tabulojn ĉe lignistoj kaj ĉe prihejmaj kaj ĝardenaj vendejegoj.

Mi segis la tabulojn por fari kvin pecojn:

kvanto	nomo	alto × larĝo	longo
2 (flankoj)	1×3	¾" × 2½" (2 × 6 cm)	33" (84 cm)
2 (kruroj)	1×12	¾" × 11¼" (2 × 29 cm)	17" (43 cm)
1 (sidplato)	1×12	¾" × 11¼" (2 × 29 cm)	33" (84 cm)

Notu ke la nordamerikaj nomoj por tabuloj ne donas ĝustajn mezurojn; ili rilatas al mezuro de krudaj tabuloj antaŭ sekigado. Do ekzemple 1×3 efektive estas nur ¾ colojn alta kaj 2½ colojn larĝa.


Iloj

- protektiloj: ŝirmokulvitroj kaj orelŝtopiloj
- krampoj/premiloj (2)
- martelo
- krajono
- mezurilo (ekz. faldmezurilo, mezurbendo)
- ortilo
- raspilo
- segilo por fari rektajn tranĉojn (ekz. trapeza segilo)
- ŝlifpapero/sablopapero
- *borilo
- *borpinto kun 1" (25 mm) en la diametro
- *segilo por fari kurbajn tranĉojn (ekz. trusegilo, saltsegilo, arabeskosegilo)

* Se vi ne faras truon en la sidplato, vi povas konstrui la benkon sen la stelitaj iloj.

Paŝoj

Komence mi mezuris kaj segis la 1×3-tabulon. Mi uzis saltsegilon kaj mian faldeblan stablon. Estas pli facile segi tabulon kiam ĝi estas krampita. Uzante la jam segitan tabulon kiel liniilon, mi tiam markis kaj segis la 1×12-tabulon por fari sidplaton kaj krurojn:



Mi segas la 1×3-tabulon per saltsegilo.

Jen la kialo por la nomo "kvin-tabula benko". La rezulto de la segado estis kvin pecoj – du kruroj, du flankoj, kaj unu sidplato:



La kvin pecoj.

La flankaj tabuloj havas oblikvajn finojn:



La flankaj pecoj.

Mi kunkrampis la krurojn por ŝpari laboron kaj tempon, kaj desegis triangulon de la malsuproj por aldoni stabilecon kaj belecon. Oni povus bori truon je la pinto de la triangulo por malhelpi fendiĝon. Eblas ankaŭ segi duoncirklon anstataŭ triangulon laŭprefere.



Mi desegas partojn de la kruroj.

Mi faris mortezojn en la kruropoj por teni la mallarĝajn flanktabulojn:



Mortezoj en la kruropoj.

En la sidplaton mi boris du 1" (25 mm) truojn meze de la laborpeco kaj proksimume 5" (120 mm) aparte. Per saltsegilo mi konektis la truojn. La rezulto estis larĝa mantruo, kiu tre utilas por porti la benkon unumane. La benko de mia avo fakte ne havis tian truon, sed mi taksas ĝin tiel utiliga, ke indas la malsimileco. Sen la mantruo, oni povus fari ĉi tiun projekton per nur rektaj tranĉoj, do sen saltsegilo aŭ trusegilo. Ankaŭ la borilo estus nebezona.



La komenco de la mantruo.



Oblikvaj najloj en la sidplato.

Post ŝlifado de la pecoj, mi muntis la benkon per najloj:



La benko komencas aspekti benk-eca.

Oni povus uzi ankaŭ gluon. Ĉar mi uzis nur najlojn, mi martelis ilin oblikve en la sidplaton por ke ili ne facile eltiriĝu:

Nun la benko bezonis nur farbon. La benko de mia avo estis mezblua, do mi uzis similan koloron por la mia. La farbo efektive estis postrestaĵo de kiam ni farbis la eksteron de mia domo:



Se vi ne celas fari elegantan meblon, tia benko tre taŭgas por simpla eksterdoma lignaĵumado. Pro la truo, eblas teni laborpecojn per F-formaj krampoj por segado. Kaj se vi renversas la benkon, la V-angulo povas teni arbobranĉojn aŭ tubojn por segado. La benko funkcias ne nur kiel sidejo, sed ankaŭ kiel stablo.



La benko funkcias ankaŭ kiel stablo.

Ŝtala ilo kiu forskrapas per multaj tranĉaj elstaraĵoj.

saltsegilo



Elektra aparato utila por rapide fari diversajn tranĉojn, aparte kurbajn.

Bild-glosaro

arabesko-segilo



Ankaŭ *laŭprofila segilo*. Utila por tranĉi kurbojn.

ŝlifpapero / sablopapero



borilo



trapeza segilo



trusegilo



ortilo



Utila por streki ortajn rektojn.

raspilo



[Fotoj de la glosaro danke al Lowes [<http://lowes.com>]
—Red.]



Daĉjo RUTAN

Daĉjo estas amatora lignajisto en nord-okcidenta Nov-Jerzejo. Per malmultekostaj iloj li faras malgrandajn projektojn por si, por sia familio kaj, de tempo al tempo, por aliuloj.

Diru al iu pri Esperanto

Mi unue eksciis pri Esperanto hazarde en la fruaj 1970-aj jaroj kiam mi aŭskultis radio-elsendon de *WOSU*, radiostacio de la Ŝtata Universitato de Ohio. Mi kontaktis la instruiston pri la Esperanta kurso, sed mi ne povis partopreni en ĝi pro universitataj studoj, laboro kaj du infanoj. Lastatempe mi trovis grupon en Raleigh – denove hazarde – kiam mi serĉis ion alian.

Kiam mi parolas kun aliaj esperantistoj, mi demandas al ili, kiel ili trovis Esperanton. Ili ĉiam respondas, ke ili trovis Esperanton hazarde. Evidente la plejparto de ni trovis Esperanton ne pro planitaj agadoj de Esperanta organizo, sed pro la sorto.

Kiam mi demandas al la ĝenerala publiko pri Esperanto, la respondoj estas aŭ, “Mi neniam aŭdis pri ĝi” aŭ “Mi aŭdis pri ĝi antaŭ longa tempo. Ĝi mortis, ĉu ne?” (Iuj eĉ opinias, ke ĝi estas religio.)

Ni bezonas antaŭageman penadon, kion mi nomas: *Diru al iu pri Esperanto*. Simple dirite, ĝi estas plano paroli kun iu ĉiusemajne pri Esperanto. Esperantistoj ankaŭ devus disdoni novan version de la broŝuro de Esperanto-USA kiu enhavas informon pri lokaj kontaktoj. Ni ja povas facile fari ĉi tion.

Esperanto estas tro grava por esti trovita *hazarde*.


Provu vi mem tiun ĉi proponon kaj raportu al mi pri la rezultoj.

— Murray MERNER, Raleigh NC
<mmmmo320@gmail.com>

Profunda instruisto

Paul GUBBINS estis amata esperantisto kiu interalie instruis multfoje ĉe NASK, recenzis la gazetojn *Monato* kaj *Brita Esperantisto*, kaj verkis plurajn bone konatajn instruilojn, ekz. *Kunvojaĝu* kaj *Pasporto al la tuta mondo*. Li neatendite forpasis la 6-an de Aŭgusto. En 2007 mi havis la bonegan fortunon partopreni (samklase kun Keneĉjo!) la kurson de Paŭlo. Per sia lerteco, sprita humuro, kaj infekta entuziasmo, Paŭlo profunde inspiris ankaŭ min. — Red.

Dum tri semajnoj en 2005, ĉe mia unua NASK-a partopreno, instruis min Paŭlo. Li jam malkovris la unuan E—an teatraĵon! Ĉiun tagon li proponis, “Ni iru en la freŝan aeron!” Reenirinte en la klasĉambbron, diris klare kaj koncize Paŭlo al ni klasanoj, “Skribu monologon!” La mia estas dediĉita “al mia profunda instruisto, Paŭlo Gubbins”.



Revenis al NASK-2007 tiu mia inspira (la sekva vorto estis preferata de Paŭlo) instruisto. Ja mi revenis. Studis ni pri William AULD. Ĉiun tagon proponis, jes, klare, koncize Paŭlo, “Skribu recenzon!”

Skribis nia Paŭlo, post kelkaj pensindaj komentoj, sur la supro de mia paĝo, “Bona provo”.

Mi larmas.

— Keneĉjo GOLDBERGO, Losanĝeleso, CA
<kenecxjo@gmail.com>

Instruu pli da matematiko kaj rezonado

Forpreno de algebro kaj geometrio de la kursaro de publikaj lernejoj vere estas malbona ideo. Ni devas kontraŭstari ĝin. Lastatempe oni aŭdas tiajn kriojn, ekzemple de la televidprogramo *PBS NewsHour*. Tiu krio ne estas sola. Instruado de algebro estas unu el la ŝtupoj por instrui homojn pensi logike. Homoj pensas laŭ du manieroj: eksplike kaj implicite. Implicite pensado estas rapida kaj necesa en danĝeraj situacioj. Ĝi provizas eblajn solvojn al problemoj. Sed la eblaj solvoj ne ĉiam estas ĝustaj. Poste oni povas rekoni la situacion kaj memori la solvon; sed oni ne scias kiel aŭ kial ĝi estas solvo.

Eksplike pensado estas malrapida kaj ĝisfunda. Sed oni scias kiel kaj kial solvo estas solvo. Ĝi rezultas de konstatoj pri naturo, farado de modeloj pri tiuj konstatoj, kaj rezonado per tiuj modeloj. Ĝi helpas nin determini se niaj ideoj estas konsekvencaj kun aliaj faktoj. Dedukta rezonado estas forta speco de eksplike pensado. Ĝi baziĝas sur la formo de

argumento. Se oni komencas kun veraj donitaĵoj kaj uzas deduktan rezonadon, la rezultoj ankaŭ estas veraj. La unua ekspono de lernantoj al pensado pri la formo de problemo estas en algebro.

Oni kutime ne devas uzi deduktan rezonadon en ĉiutaga vivo. Sed ni ĉiuj dependas de ĝi. Ni bezonas ventumilojn kiuj ne dispeciĝas dum ili rotacias por blovi aeron, kaj pontoj kiuj ne kolapsas kiam kelkaj dek-ok-radaj kamionoj haltas sur ili. Ni bezonas elpensitajn planojn por bontenado de aviadiloj. Ni bezonas komputilajn programojn kiuj ne misfunkcias. Por garantii tiun specon de bona funkciado en nia mondo, estas necese havi dedukte elpensitan komprenon de ventumiloj, pontoj, aviadiloj, komputila arkitekturo, kaj programoj.

Sed ni bezonas ne nur bone elpensitajn teknikajn sistemojn. Ni bezonas ankaŭ bone elpensitajn leĝojn, financajn sistemojn, kaj regadon de firmaoj. Ni ankaŭ bezonas leĝfarantojn, ekonomiistojn, bankistojn, kaj administrantojn kiuj povas pensi kaj numere kaj dedukte. Do ni bezonas pli grandan onon da homoj en Usono kiuj povas pensi dedukte. Ni bezonas instrui algebron, geometrion, trigonometrion, analitikon, kaj logikon al pli granda ono de nia loĝantaro. Ne pli malgrandan onon.

— *Fred MEYER, III*

Venu kaj klaĉu

Sidante en komfortaj foteloj en alloga trimura ĉambro, vespere, (sen kafo) ni klaĉis. Eniris, eliris naskanoj babilemaj, aŭskultemaj, ŝercemaj, pensemaj. Tio ĉi ja povos denove okazi ĉe Universitato William Peace en Raleigh [rali], ŝtato Norda Karolino, Usono, de la 28-a de Junio ĝis la 7-a de Julio ja en 2017, '18, kaj '19!

Mi revenos. Mi lernos. Mi klaĉos. Venu, venu!

— *Keneĉjo GOLDBERGO, unu el la entuziasmaj partoprenantoj en NASK-2016*


Skribu al *Usona Esperantisto!*

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



Bridge of Words

A new history of Esperanto has been winning glowing reviews and generating much positive media attention. *Bridge of Words: Esperanto and the dream of a universal language* covers the birth of the language, its early struggles, and provides a look inside modern *Esperantujo*.



Author Esther Schor is a professor of English at Princeton University who interleaves the history of the language with her experiences using it in Vietnam, Poland, Turkey — and here in *Usono* at NASK. Below are excerpts from a few online reviews. Might one of our members like to write their own review for *Usono Esperantisto?* – Ed.

- ***The Washington Times*** [<https://goo.gl/2UJNzq>]

Perhaps the most remarkable characteristic of “Bridge of Words” is its author’s passionate engagement with Esperanto. What started out as an examination of how it fared turns into an immersion into what is, astonishingly, even in the 21st century, an enduring alternate universe.

- ***Haaretz*** [<https://goo.gl/nW3Qz6>]

... the prospect of a truly universal language still seems like a good idea, despite being far from realization. Even becoming one of the *samideanoj* and a member of *la granda rondo familia* sounds like a good time, at least in Schor’s account. Maybe the answer to the question of whether we should have a common tongue [...] is in fact yes: We should all be learning Esperanto.

- ***The New York Times*** [<http://nyti.ms/2eJQeNV>]

In portraying a language condemned by both Hitler and Stalin, then used by the American military as the language of the pseudo-Communist “Aggressor” in a lengthy series of Cold War maneuvers, “Bridge of Words” leaves us in no doubt that whatever Esperanto might be doing, it seems to be doing it right.

- ***The New Yorker*** [<https://goo.gl/NwzklQ>]

By invoking the one thing that we know we have in common with others, we throw a rope across the divide, asserting that, whatever our differences, we do share something: when it rains on one of us, it’s going to rain on the other one, too. Schor quotes the Spanish Esperantist Jorge Camacho: “Esperanto continues to give me something... which I don’t find anywhere else, an irrational sense of directly belonging to the world.”

- ***LA Review of Books*** [<https://goo.gl/eEcQkC>]

While it never achieved the *finavento* (final victory) projected by its more devoted acolytes, Esperanto is today “a living language with a worldwide community,” reports Esther Schor in her fascinating new history. The language has survived derision, repression, and the onslaught of global English, and it still has an estimated million-plus speakers in a hundred-odd countries.

Bridge of Words: Esperanto and the dream of a universal language [<http://amazon.com/dp/0805090797>]
Esther Schor

Hardcover and Kindle editions available. 384 pages.
Metropolitan Books, 2016. ISBN 0805090797.

senintenca esperantaĵo?

Leki



Jen mia marŝbastono, varo de germana firmao kies nomo laŭdire estas mallongigo de *Lenhart in Kirchheim*. Kiel esperantisto, mi devas ĉiam rezisti la tenton ŝovi la langon sur ĝin. Aparte en frosta vetero. – Red.

Usona Esperantisto

Redaktoro / Editor: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Usona Esperantisto estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo *cc-by-sa* [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eu>]. Kiel komplezon, ni cetere petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj la redakciajn konvenciojn.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike (cc-by-sa) license [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>]. As a courtesy, we ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and our style manual.